

命のつながり

Ligiteco de la Vivo

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

『阿弥陀経』に「共命鳥」(ぐみょうちょう)という鳥が出てきます(表紙絵参照)。美しい羽毛と鳴き声をもっていますが、一つの身体に二つの頭、という奇妙な姿をしています。

しかしこの二頭は、「私こそが世界でいちばん声が美しい」と思って、互いに仲が悪く、ついには「相手さえ亡きものにすれば、この私が世界一になれる」と考えるようになり、ある日密かに毒を混ぜ、片方に食べさせました。食べた方はもちろん死にましたが、食べさせた方も体が一つですから、死んでしまいました。しかし死ぬ直前に、「なんと愚かであったことか」と覚ったので、極楽浄土に往生することができ、その美しい声で法を説き続けています。その説法とは「他を滅ぼす道は己を滅ぼす道、他を生かす道こそ己の生かされる道」というものです。

命のつながり、といえば、親から子へのつながりを連想されがちですが、ほんとうはもっと広いのです。血縁関係で言うならば、世界の70億人の人々、いや人間だけでなくすべての生物は、40億年前という太古の昔に誕生した原始生命から進化・枝分かれをしてきました。つまり、すべての生き物

En la malgranda sutro pri Sukavato aperas la birdo nomata "kunvivo" (sanskrite: *jīvaṃjīvaka*). Ĝi havas belajn plumojn kaj voĉojn, sed neordinaran figuron, ĉar ĝi estas dukapa.

Ĉiu el la du kapoj pensis: "Mia voĉo estas la plej bela en la mondo." Tial ilia interrilato estis malamika, kaj finfine unu el ili ekpensis: "Mi fariĝos vere la plej supera en la mondo, se la alia mortos." Iun tagon li sekrete almiksis tokson al la manĝaĵo por la alia. La manĝinta kapo kompreneble mortis, sed la manĝiginto ankaŭ mortis, ĉar ili havis la saman korpon. Sed tuj antaŭ la morto la birdo ekkonsciis la stultecon de sia ago, tial ĝi povis renaskiĝi en la Sukavato. Ĝi nun per sia bela voĉo predikas: "Se vi pereigas la aliajn, tio pereigas vin; se vi feliĉigas la aliajn, tio feliĉigas vin."

Se temas pri ligiteco de la vivo, oni tuj imagas la rilaton inter gepatroj kaj gefiloj. La rilato estas tamen multe pli vasta. Se diri pri parenceco, sep miliardoj da homoj en la mondo, ne nur homoj sed ankaŭ ĉiuj vivaĵoj, disvolviĝis kaj disbranĉiĝis el la praa vivaĵo naskiĝinta en la tre malnova tempo, nome antaŭ kvar miliardoj da

は私の遠い親戚といってもいいのです。

血縁関係、すなわちDNA連鎖という生物学的なつながりだけではありません。この私が身体をもち、ものを考え、話をし、活動ができるのは、私の外部の生物・無生物があつてこそです。一切れの肉、一枚の衣服、一本の鉛筆、これらすべて私が無から作り上げたわけではありません。いろいろな条件が蓄積されて、この私の元に届けられたのです。

さらにいうならば、いかなる存在も独立自存しているものはありません。すべてが関係性をもち、原因をもち、結果をもち、相互依存の関係にあります。これが仏教でいうところの「縁起」です。人間存在にこれを適用すれば「無我」でもあります。私たちは日常生活の中でこれを「おかげさま」といいならわしてきました。

しかし私たちはともすると、自分の都合のいい時にだけ「おかげさま」といい、都合が悪いと「～のせいで」と責任転嫁しがちです。

あなたには憎い相手がいるかもしれませんが。その憎い相手を憎み続けている限り、かつての共命鳥と同じ愚かさを繰り返すでしょう。個人間のことだけでなく、民族と民族・国と国・宗教と宗教との関係についても同じことがいえます。対立は自分を滅ぼす毒です。命のつながりを思う時、すべての人・すべての生き物に対する敬意と愛情、そして共感が生まれてきます。

jaroj. Tio signifas, ke ĉiuj vivaĵoj estas miaj parencoj.

Tiu ĉi parenceco estas ne nur sanga, t.e. biologia kun la ĉena rilato de DNA. Mi havas la korpon, pensas kaj agadas, nur pro eksteraj vivaĵoj kaj nevivaĵoj. Viando, vestaĵo, krajono... ilin ĉiujn mi ne povis krei el nenio. Diversaj kondiĉoj akumuligis kaj nur pro tio la supre menciitaj aĵoj alvenis al mi.

Se plu diri, nenio ekzistas per si mem. Ĉio havas rilaton kun ĉio alia, havas kaŭzon kaj rezulton, do ĉio estas interdependa. Tion ĉi budhismo nomas "laŭkondiĉa estiĝo" (sanskrite: *pratitya-samutpāda*). Se tiu ĉi leĝo estas aplikita al homa ekzisto, ĝi estas nomata "senegoeco" (sanskrite: *anātman*). Ni kutimis uzi ĝin en la ĉiutaga vivo per la esprimo "dank' al").

Sed ofte ni uzas la esprimon "dank' al ..." nur en la okazo favorata al ni, sed ofte imputas ian malfavoraĵon al aliulo dirante "se li ne estus ...".

Ĉu vi havas malamikojn? Se vi daŭrigas malami ilin, vi eventuale faros la saman stultan agon kiel la iama birdo "kunvivo". Tio estas vera ne nur en la rilato inter individuoj, sed en tiu inter nacioj, ŝtatoj, religioj k.a. Kontraŭstaro estas tokso, kiu pereigas nin mem. Kiam ni profunde pensas pri ligiteco de la vivoj, tiam naskiĝas respekto, amo kaj simpatio al ĉiuj vivaĵoj.